# NOVA EKONOMIA POLITIKO

monata revuo pri monsistemaj, ekonomiaj kaj kulturaj aferoj

Redakcio: **G. Kolb**, Worms a. Rh., Dominikanerstr. 1 (Germanujo).

Eldonejo: **A. Meissner**, Frankenthal (Pfalz) Germanujo (Deutschland).

1ª Jaro — Oktobro 1926 — 1ª Kajero

## Enkonduko.

La gazetaro superregas nuntempe ĉie la publikan opinion preskaŭ senkondiĉe. La propagando dum la mondmilito pruvis tion eĉ al la plej kredema.— Ofte ne estas grave, ke la gazetinformoj estu aŭ veraj aŭ malveraj, sed ĉiam estas grave, ke la gazetredaktoroj uzu tiun minimumon da lerteco, kiu estas necesa por fari kredebla iun ajn tezon al la ordinara leganto.

Ekzemple asertis la germana gazetaro: La marko ne estas stabiligebla, se oni ne korektas la kontrakton de Versailles. Kaj tiu ĉi aserto estiĝis la devizo de l'publiko.— Sed la germana registaro pagis la riparsumon laŭ la kontrakto de Versailles, kaj tamen malaperis la inflacio (monplimultigo). La tuta gazetaro germana nun raportis pri la miraklo de la renta marko, kaj la publika opinio kredis al tiu miraklo—. La sama gazetaro germana skribis: Ni bezonas prunton de 800 milionoj por resanigi nian mastrumadon, kvankam oni prenis el la mastrumado malsana samtempe miliardojn. Tamen la artikoloj de l'gazetoj sugestis la publikon aprobi la projekton de Dawes.

En Francio oni povas konstati similan staton. La konfliktoj en la franca parlamento estas nur tromp-atakoj. Ankaŭ en Francio oni trovos per la franca gazetarhelpo rimedon, kiu ebligos la akcepton de l'Dawes-projekto.

Ankaŭ en aliaj kulturlandoj la gazetaro influas la publikan opinion.—

La povo de l'gazetaro estas preskaŭ absoluta. Ĝi povas skribi la plej fortajn paradoksojn, tamen neniu el la milionoj da legantoj postulas klarigon pro malveraj pretekstoj. Tial estas la estroj de l'gazetaro la veraj regantoj de l'ŝtatoj. Kaj kiuj estas ĉi tiuj regantoj?

Kapitalista interes-politiko kaj miopa partia egoismo elsuĉas la sangon de ĉiuj popoloj. Ili malhelpas — aŭ vole aŭ nevole — la pritrakton kaj solvon de l'plej gravaj nuntempaj problemoj.

Riparproblemo, valutproblemo, sociala problemo k. t. p. ĝis nun ne estas solvitaj. — Eĉ la laiko supozas, ke ekzistas interligo de tiuj aferoj. Sed la solvo prosperos nur, kiam ni ricevos klarecon pri la kaŭzoj de la interligoj supre nomitaj. — Dum ekzistis la kredo, ke la tero estas disko, kompreneble estis eraraj ĉiuj konkludoj faritaj pro la menciita supozo. Simila estas la situacio en la naciaj ekonomioj. Oni ne trovas la solvon, ĉar ne malaperas la fundamentoj absurdaj kaj ne plu modernaj. Sed tiuj fundamentoj ne malaperas pro tio, ĉar kelkaj potenculoj havas grandegan gajnon el tiu afero.

Novaj ekkonoj nepre necesas, ĉar nova ekonomia politiko estas necesa. La pioniroj de novaj ideoj devas ĉiam lukti kontraŭ fortegaj malfacilaĵoj. Ankaŭ la adeptoj de nia libera ekonomia doktrino ne estas esceptataj. Pro tio ni fondis tiun ĉi revueton por disvastigi internacie nian ideon, kiu jam havas anaron en jenaj landoj:

Svislando: Schweizer Freiwirtschaftsbund (svislanda liberekonomia ligo) Bern, Schwarztorstrasse 76;

Anglujo: Free Economy League, (liberekonomia ligo), London, Holloway Road 329;

Francio: Aliance Nationale d'économie franche (nacia societo de la libera ekonomio), J. Barral, Berre-des-Alpes (A.-M.);

Germanio: Physiokratischer Kampfbund (fiziokrata batal-ligo) Berlin C 54, Sophienstrasse 6;

Deutscher Freiwirtschaftsbund (germana libera ekonomia ligo), Hamburg 5, Grosse Allee 2;

Aŭstrujo: Freiwirtschaftsbund (libera ekonomia ligo), Wien III, Traungasse 3;

Rumanujo: Ligue pour l'économie franche (ligo por libera ekonomio), Botosani, Strada Cogalniceanu, 10;

Secrétariat International (internacia sekretarejo), Fr. Schwarz, Bern, Erlachstrasse 5 (Svislando).

La eldono de nia malgranda revuo estas nur la unua ĝermo. Sed ni esperas certe, ke ĝi veku la komprenon por niaj postuloj, por ke formiĝu la forta asocio de ĉiuj fakte laborantaj klasoj, realigonte ekonomian programon, kiu kontentigos ĉiun laboranton fervoran. Ni deziras, ke sukcesu la laboro!

# La problemo de la mondpaco.

Antaŭ kelkaj jaroj skribis angla esperantisto (membro de Sennacieca asocio tutmonda) en «Sennacieca Revuo» jenan frazon:

«Se la riĉuloj nepre devas havi militon, lasu ilin mortpafi unu la alian — tio estas bono por la mondo, estos malpli da parazitoj por suĉi nian ŝvitlaboron.»— Tute certe, tiu stato estas dezirinda, sed neniam la homaro atingos ĝin, se ĝi ne konas la kaŭzojn de ĉiuj bataloj kaj la rimedojn por malebligi la militojn.—

Sendube, la rifuzo de la militservo estas bona ago, sed ĝi ne sufiĉas kaj postulas nur viktimojn superfluajn; ĉar la rifuzo de l'militservo estas nur ago pasiva, sed ni bezonas energiojn aktivajn, kaj tiuj estas nur eblaj, se ni ekkonas la kialojn.—

Kiaj ĉefkaŭzoj faras la militojn? La intercivitana kaj la interpopola pacoj havas la samajn kaŭzojn. Inter ŝtatoj, kiuj estas sanaj, kiuj havas veran civitanan pacon, ne povas ekzisti milito. Sed ŝtatoj, en kiuj furiozas la klasbatalo, neniam naskos veran pacon. Kiu volas la interpopolan pacon, devas krei la civitanpacon. La civitanpaco estas la embrio por la interpopola paco. Viroj prudentaj antaŭdiris dum la komenco de l'mondmilito, ke ĝi degeneros al la civitanmilito. Nur la esprimo «degeneros» en tiu kazo estas erara, ĉar ne degeneras interpopola milito al la civitanmilito, sed kontraŭe la civitanmilito, ankaŭ nomata klasbatalo, kiu ekzistas ĉe ĉiuj kulturpopoloj, degeneras al interpopola milito.—

La kaŭzoj de la klasbatalo estas ekonomiaj aferoj. La sklaveco de l'antikva tempo havis nur la celon, krei perforte la saman staton, kiujn oni nomas hodiaŭ «burĝa ordo», t. e. kreo de laborista armeo, kiu devas porti ĉiujn ŝarĝojn de la vivo. La klasifiko de la popolo laŭ rentuloj kaj ŝarĝazenoj ne estas laŭnatura, kaj pro tio oni povas apogi nur per despotismo ĉi tiun staton. Sed despotismo poveco provokas la militon.—

Ordigita ekonomio protektas ankaŭ la pacon. La kontrastoj de la mondo spirita ne severe malhelpas la pacon. Eĉ la t. n. religiaj militoj estis nur ekonomiaj militoj.— Ekzistas nur du kaŭzoj, kiuj faras la klasbatalon: La ter-privilegio kaj la metalmono (aŭ papermono, imitita laŭ la metalmono).— Se ni ne laboras por energie forigi tiujn instituojn, tiam havos ĉiu reformo kaj revolucio nur malmulte da sukceso. Ekzemploj: la granda franca revolucio (1789) kaj la germana revolucio post la mondmilito. Depost la ekzistado de la bienpropraĵo privata kaj de la interŝanĝilo metala ne estis ebla paco vera, nek interna, nek ekstera. La sola stato inter rentuloj kaj laboristoj estas la batalo.—

La paco estas entrepreno granda. Pro tio ĝi bezonas ankaŭ grandajn rimedojn. Ĝi ne postulas homoferojn, sed monon, multege da mono kaj oferojn de privilegioj, de naciaj antaŭjuĝoj k. t. p.— Estis kaj estas eraro de ĉiu pacamiko, ke li ne sufiĉe estimas la grandecon de la tasko kaj kredas atingi la celon per malsufiĉaj armiloj. Estas necese pritrakti la objektojn, kiujn oni volas oferi por la paco.

1. La vegetaranoj kaj abstinuloj elvokas: milito estas malsana spiritstato, devenanta de malsana stato de l'korpo, kiu estas ruinigita per viandmanĝaĵoj, per tabako kaj alkoholo. Oferu la alkoholon kaj vi estos prudentaj kiel la serpentoj kaj pacemaj kiel la ŝafoj.— Tiuj frazoj enhavas sendube multe da vero. Sed la paco ne venos per tiuj ĉi malgrandaj oferoj. Jam ekzistis militoj, antaŭ la degenerado de l'popoloj per alkoholo kaj tabako.

2. Alia rimedo rekomendita kontraŭ la milito estas la naska striko. Ne naskoj — ne soldatoj — ne militoj. Sendube bonega rimedo. Sed kiuj ricevus la fruktojn de tiu ĉi paco? Nur la infanoj de la naskintaj strikrompintinoj.

3. Oni rekomendas ankaŭ la rifuzon de l'militservo. Tiu ĉi rimedo estus certa, se ĉiu homo havus heroismon por rifuzi la servon. Sed ekzistis nur unu «Arnold de Winkelried» (ekp. Vinkelrid), nur unu «Giordano Bruno» (ekp. Ĝordano Bruno), nur unu «Huss» (ekp. Hus). Kiu postulas ĉi tiun heroismon, postulas la forigon de l'egoismo, de la memkonservado, kiu estas inter la homoj feliĉe pli forta ol la sopiro al la paco.—

4. Tre naive la militisto solvas la problemon. Li venkas la malamikon, metas la piedon sur la bruston de la venkito kaj demandas lin, ĉu li volas paciĝi.— Tiu ĉi maniero konservas fakte ĉiujn kaŭzojn, kiuj provokis la militon. La venkinto estas kontenta, sed la venkito pripensas la venĝon. La soldata paco ne daŭras.—

5. La plejmulte pritraktita propono por krei la pacon, estas la kreado de la interpopola juro, de internacia leĝo. Laŭ opinio de l'pacifistoj oni nur devas perfektigi kaj garantii tiun juron. Tiu ĉi interpopola juĝo devas serĉi ĉiam fortojn per la «justeco», la «moralo», la «libereco». Sed pri la ecoj de la interpopola justeco oni ne diskutas. Oni kredas nur, ke la justeco estas objekto, kiun vidas ĉiuj homoj per samaj okuloj.

Kiu en la mondo rajtas nin kredi tion? Ĉu estas eble la publika vivo en ĉiuj klasŝtatoj universitato de la justeco? Niaj despotoj en ĉiuj landoj rigardis senskrupule la morton de la suĉinfanoj en Berlino, Londono, Parizo k. t. p. Kiu volas lerni la amon de l'justeco, lernu en la familio, la komunumo, kaj inter la propra popolo. Kiam oni havos la pacon en la propra lando, tiam oni povos ankaŭ prediki la mondpacon al la aliaj popoloj.—

Bonege! diros la pacifistoj. Tion ni volas. Ni volas en la kadro de l'interpopola, internacia leĝo konservi la aŭtonomion de ĉiu popolo.—

Sed la privilegioj de l'ŝtatoj kaj popoloj jam estas tro multaj. Oni devas limigi ilin, kaj enkonduki la gehomajn rajtojn anstataŭ la ŝtataj privilegioj. Interpopola juĝo estas milito, homjuĝo estas paco.—

Resume oni povas diri: La bienprivilegioj de l'popoloj kaj ŝtatoj preparas la militon, kaj la eksplodkapsulon liveras la spirito degenerita de l'klasŝtato. Paco kaj bienpropraĵo — aŭ privata, aŭ nacia — estas antagonismoj ne solveblaj. Estas senvalore paroli pri la paco, se ni ne povas forigi ĉi tiujn instituojn praaĝajn kaj barbarajn. (Daŭrigota.).

# Profito.

Tiu ĉi vorto validas por la tuta ekonomio. Eĉ la ordinara viro el la popolo al kiu estas ne sufiĉe klara la signifo de tiu vorto, demandas, antaŭ ol li ekkomencas ian laboron: Kiom mi gajnos? Kiam la gajno ne sufiĉas al li, tiam li ne faros la laboron.

La senlaborulo ne faros ian produktaĵon, kiu ne estas profitdona. Sed nuntempe estas jam profita la laboro de l'senlaborula prizorgo, ĉar ĝi garantias al li la ricevadon de la senlaborula subteno. Se ne estus tio, oni ne trovus laboristojn, ĉar ili preskaŭ havus nenian utilon ekonomian.

Alia afero estas la farado de konsum-varoj, destinataj por la senpera konsumo. Tiukaze sole decidas aŭ la emo al la laboro aŭ la celado, fari tiajn varojn por la propra uzado, por pliigi la propran bonstaton, sendepende de la labordivido. Kiel la laboristo devas agi ankaŭ la anoj de aliaj metioj. Eĉ geniuloj devas fari tion, ĉar alikaze ili mortus pro malsato.

Tia profitemeco estas ekonomie sana. Ĝi servas por la produktado de varoj. Sed la profiteco de l'financkapitalo estas alia afero. Ĝi malhelpas la produktadon, ĉar la financkapitalo postulas ne rajtigitan tributon (renton), alikaze la monposedanto ne forpruntas la monon. Li demandas: Kiom da procentoj mi ricevos, se mi forpruntos mian monon? Li ne estas rajtigita postuli tian pagon, ĉar la mono, verdire, ne estas propraĵo, sed ŝtata interŝanĝilo; ĝi devas faciligi la interŝanĝon de l'produktaĵoj. Vera monposedo ne ekzistas, sed uzadposedaĵoj, nur akiritaj per laboro honesta.

Kiu ne laboras, ne rajtas manĝi. La ĝuado de l'vivo per rentoj ne estas laboro, sed ŝtelo. Tia vivo estas grandega krimo kontraŭ la homaro kaj malutilas la honestan laboron. Bedaŭrinde oni ne prijuĝus la rentpostulojn kiel krimo, kaj la juĝistaro punas pro tiaj postuloj nur, se ili estas tro evidentaj.

La kristana eklezio malpermesas la premegon de l'malriĉuloj, de l'vidvinoj kaj de l'georfoj kaj konsideras ĝin kiel peko terura. Kaj ĝi estas prava. Kiu apartenas al la malriĉuloj? Sole la laborantaj klasoj.

Kiam oni vidas, ke milionoj da gehomoj devas oferi sen kompenso parton de la farita laboro al la profitemeco de l'financa kapitalo, kiam oni vidas, ke multe da homoj ne havas la eblon fari produktivan laboron kaj pro tio suferas malsaton kaj mizeron tiamanieran, ke multaj libervole finas la vivon pro malespero, tiam oni ekkonas la tutan frenezecon de l'profitemeco financkapitalista. Kaj ĝi kaŭzas tian frenezecon per interŝanĝilo, kiu apartenas al la socio. Bedaŭrinde tiu interŝanĝilo estas neperfekta kaj pro tio akiris ĝin nur malmultaj homoj, kiuj ĝin uzas senindulge por premegi la aliajn.

La monposedanto konas nur unu leĝon: La sumon de l'rentoj. Kiam li kredas, ke li ne ricevas sufiĉan gajnon por sia mono fordonata al la produktado, tiam la entrepreno ne plu estas profitdona al li — kaj li forprenas sian monon el la komerco kaj kreas pro tio senokupecon kaj ekonomian mizeron.

Sed la vera tasko de l'mono estas sole, interŝanĝi la produktaĵojn kaj ĝi ne utilas, se oni kolektas ĝin, por ke ĝi manku en la produktado.

Neniu estas rajtigita uzi la monon por aliaj celoj ol por la cirkulado en la trafiko. Tui cirkulado kreas produktaĵojn, kiuj sole estas necesaj por la vivo. La mono estas nur helpilo por ebligi nuntempe la interŝanĝon de l'plej gravaj varoj.

Kion oni pensus, se kelkaj personoj povus haltigi la fervojan trafikon pro profitecaj kaŭzoj? La efiko estus la sama kiel la haltigo de l'moninterŝanĝo. Nur la efikoj rilate al la fervojo estas pli videblaj, ĉar la gehomoj atentas pli zorgeme la fervojan trafikon ol la monsistemon, kiun ne konas sufiĉe la gehomoj. la fervoja striko malutilas la fervojon kaj la monposedanton, sed la striko per la mono utilas nur la monposedanton. La monvaloro pliiĝas kaj la financkapitalisto povas aĉeti pli grandan kvanton da produktaĵoj kaj malutilas pro tio la produktadon. Ĉe la perfervoja striko aperus la kontraŭa efiko, ĉar la fervojo perdus valoron pro la neuzado.

Ambaŭ partoj, mono kaj fervojo, havas la saman celon interŝanĝi la produktaĵojn. Nur unu diferenco ekzistas: La fervojo estas konforma al la ekonomio, sed ne la mono. Ĝi estas depost jarmiloj ĝis nuntempe la sama mono kun ĉiuj malutiloj. Oni devas perfektigi teknike la monon, por ke ĝi servu kiel bona mono al la trafiko.

Ekkono estas la unua paŝo al la plibonigo. Pro tio ni volas forigi la malperfekton de l'mono kaj ĝin taŭgigi al la trafiko kiel oni perfektigis teknike la fervojon. Neniam plu servu la trafiko al la mono, sed kontraŭe la mono servu al la trafiko.

Tiam estas solvata la problemo de la profiteco, ĉar ne ekzistas plu profiteco, sed ekzistas nur la problemo de la utileco.

Nova vivo estiĝas el la ruinoj. La ekonomio ekfloros denove, kaj ĝi ne ekskuiĝos plu kiel febromalsanulo per krizoj. Sana sango konservas sane la korpon kaj bona mono konservas la ekonomion. Ni kreu monon laŭ propono de Silvio Gesell, ĝi garantios per ĉiama cirkulado produktadon ne malhelpatan, kaj senlaboreco kun akompanata mizero malaperos.

La malbona ekonomio ne ekzistos plu, kiu estas la kaŭzo de la ekspluado kapitalista — kaj estos nur kontentaj homoj.

El «FZ., Freiwirtschaftliche Zeitung» tradukis G. K.

# La kaŭzo de la senlaboreco.

La «Universala Esperantia Librejo» en Genève eldonis broŝuron pri «la kaŭzo de la senlaboreco». La verkinto H. C. Mees estas disĉiplo de la doktrino de Malthus. Sur kvardek paĝoj de sia leginda broŝuro li pritraktis koncize tiun teorion. Li resumas per jenaj frazoj:

1a La produktado de nutraĵoj de difinita terareo estas limhava.

2a La plimultiĝa povo de la homo estas senlima.

3a La homo estas regata de pluenplanta (plimultiĝa) instinkto instiganta lin konstante al kiel eble plej rapida plimultiĝo.

Sur la restaj dekok paĝoj de sia verketo li pritraktis la kaŭzon de la senlaboreco laŭ la doktrino de Malthus. Kaj pro tio mi skribas jenan artikolon por klarigi la senlaborecan problemon laŭ la teorio de Silvio Gesell.

Sendube, la aserto de Malthus, ke la produktado de nutraĵoj de definita terareo estu limhava, estas trafa. Aukaŭ la aliajn nomitajn frazojn pri la plimultiĝa povo kaj la pluenplanta instinkto de l'homaro enhavas multon da vero. Tamen mi ne povas konsideri la troloĝatecon kiel kaŭzo de la senlaboreco. Almenaŭ ne validas tiu kaŭzo nuntempe.

Sur la lasta paĝo de sia broŝuro la aŭtoro iom tuŝis parton de la problemo, kiun mi volas pritrakti. Li skribis: «Pri la regulo, ke ĉiu devas labori por povi manĝi, la rentuloj faras escepton.» La verkisto konsideras ankaŭ la enspezojn de la rentuloj kiel io maljusta, sed la grandegan signifon de tiuj enspezoj li ne ekkonis. Li mencias ankaŭ la monon, ties gravecon por la ekonomio li ankaŭ ne sufiĉe konceptis.

La teorion de Malthus konas malmulte da homoj, sed la teorio pri la monsistemo estas preskaŭ tute nekonata. Silvio Gesell estas la unua ekonomisto, kiu kreis klaran kaj ĝustegan mon-teorion. Li kreis ankaŭ teorie la eblecon, aliigi la nuntempan monon, por ke ĝi estiĝu vera interŝanĝilo. Ĉar la interŝanĝilo «mono» estas la sango de la ekonomio.

La hodiaŭa mono ne sufiĉas por reguligi la ekonomian trafikon. Kial? Oni rigardu la diversajn produktaĵojn kompare kun la mono, kaj oni trovos, ke la produktaĵoj iom post iom malvaloriĝas. Nur la mono estas ĉiam samvalora. (Pri inflacio kaj deflacio — monpliiĝo kaj monmalpliiĝo aperos artikolo aliloke.)

Pro tio, ke la mono havas ĉiam la saman valoron, ĝi havas ankaŭ grandegan superregon kompare al la produktaĵoj. Kaj tiu superrego kreskas per la rentoj gajnitaj el la forpruntita mono.

La monkapitalo regas la labordividan ekonomion. Malbona reganto ne povas krei bonstaton. Nia nuntempa «or»-monsistemo estas malbona reganto. Malbonaj regantoj estas ankaŭ la ŝtatestroj, kiuj ne komprenas la econ de l'mono. Bedaŭrinde preskaŭ ĉiuj politikistoj en la mondo parolas pri la plej diversaj problemoj, sed pri la monsistemo parolas nur malmultaj. Kaj la solaj personoj, kiuj instinkte perceptas la signifon de l'mono, misuzas ĝin por propra utilo kontraŭ la intereso de l'ekonomio.

Nun mi volas montri koncize, kian eksterordinaran malutilon faris kaj faras la nuntempa mono. Ĝi influas preskaŭ ĉiujn homajn aferojn.

Antaŭe kelkajn frazojn pri la valuto (pli bone: etalono).

Nia hodiaŭa ekonomia ordo ekzistas per la divido de l'laboro. Ĝia signo estas la produktado de varoj. Varoj estas ekonomiaj produktaĵoj, kiujn ne konsumas, sed vendas la produktanto. Dum la estinteco oni faris tion per interŝanĝo de varoj, sed poste, kiam aperis la iom post iom kreskanta labordivido la homoj devis forlasi tiun simplan metodon. Estiĝis la mono. Nuntempe varoj kaj mono bezonas unu la alian. Forigo de la interŝanĝilo «mono» signifus revenon de ekonomia prastato kun malmulta loĝantaro. Kie hodiaŭ vivas dek milionoj da homoj, nutriĝus per senmona ekonomio eble nur unu miliono. La intersanĝo de varo kaj mono kaŭzas la prezon. La preznivelon destinas oferto kaj demando.

La interŝanĝrilato inter mono kaj varo estas la fundamento de nia ekonomio. Kie oni malatentas ĝin, aperas ekonomiaj malhelpaĵoj. Denove mi akcentas: sole la interŝanĝo de varoj kaj mono faras la prezon. La prezo estas samgrava por aĉetanto kaj vendanto. Pro tio estis ĉiam la prezo la ĉefpunkto de l'intereso ekonomia. Sed nur la mez-prezo de l'varoj, kiu estas ĉiam la sama, indas konfidon. Bedaŭrinde ekzistas ankoraŭ la erara opinio, ke la materialo, el kiu fariĝas la mono, estas la vera valoro de l'mono. La materialo ne esta grava, sed gravega estas bona monadministracio de la ŝtatoj.

Ĉiu monsistemo ĝis nun estis ne taŭga, ĉar oni ne atentis la interligon de mono kaj varo.

Precipe la socialistoj serĉas, influata de Marx, la difekton de nia ekonomio en la produktado. Estas eraro. La egaligo de la produktado signifas unufoje malpliiĝon, alifoje pliiĝon de la produktado.

Per malpliiĝo estiĝus senlaboreco, ekonomiaj krizoj. La pliiĝo utilus nur, se dependus la kaŭzoj de la produktado de la homa volo. Sed la produktado dependas de la naturaj fortoj kaj riĉajoj, kiujn ne povas influi la homo. Pro tio la homo nur povas egaligi la monon, ĉar ĝi estas produktaĵo de l'homo. La valutproblemo oni povas sole solvi per la monreformo.

La germanoj kaj la francoj certe konas la inflacion. La efiko de ĉiu inflacio signifas mizeron por milionoj da homoj. Ĉiu kalkulo estas neebla dum ia inflacia periodo. La kreditoro malriĝiĝas la ŝuldanto gajnas. La salajro de la laboristaro estas preskaŭ senvalora, ĉar la prezoj de l'varoj pliiĝas pli rapide ol la salajro. La striko estas preskaŭ senutila por la laboristaro, ĉar la difekton, kiu estiĝis per la striko, devas pagi do la laboristoj. La ĉefkulpuloj estas konzerne al la inflacio la financministroj kaj la popolreprezentantoj, kiuj ne komprenis fari sanan financpolitikon. Kiu havas altan oficon, devas ankaŭ koni la sciencon de sia metio. La financministroj devis scii el la financhistorio de l'diversaj popoloj, kiun efikon havas senplana monpliigo.

Per ĉiu enciklopedio ili povis sciiĝi, ke dum la franca revolucio la monpapera cirkulado la prezojn altigis terure. Eĉ nur maldetala atento al la financa historio montras, ke la sinsekvo de l'okazoj estas jena: monpliiĝo = prezpliiĝo, monmalpliiĝo = salajrobataloj, strikoj, civitana milito kaj fine katastrofo.

La inflacio kiel la deflacio (plimalaltiĝo de l'prezoj) povas esti faritaj arbitre. En la jaro 1907 Morgan ordonis al siaj bankistoj reteni ĉiujn monsumojn enspezatajn. Pro tio estiĝis deflacio, la prezoj plimalaltiĝis, la komerco ne plu prosperis, la uzinoj fermiĝis kaj la laboristaro estiĝis senlabora. Sekvis bankrotoj, memmortigoj kaj senlaboreco.

En la jaro 1873 la nova «or»-monsistemo kaŭzis en Germanujo ĝeneralan prezplimalaltiĝon daŭrantan ĝis la jaro 1880. Resulto: Mizero de la terkulturo, almozpetado, vagado, senlaboreco, elmigrado. Dum tiuj ĉi jaroj fondiĝis kaj prosperis la socialdemokrata partio.

La antikva Romo pereis kun sia tuta potenco, ĉar la arĝentaj minejoj en Hispanio kaj en norda Afriko estis elĉerpitaj. La monsumojn en la imperio malpliiĝis, la prezoj plimalaltiĝis, la labordivido estiĝis pli primitiva, la senmona interŝanĝo aperis, kaj tio estis la fino de l'roma imperio. La mizeroj de niaj modernaj ŝtatoj pro inflacio kaj deflacio certe estas konataj.

Ne estas eble, detale priskribi la kaŭzojn de la senlaboreco pro malĝusta uzado de l'mono en la ekonomia trafiko. Pri tiu temo sekvos aliaj artikoloj en nia revuo. Mi nur volas resumi tiun ĉi artikolon:

Mi ne dubas, ke la teorio de Malthus estus trafa por homoj vivantaj izole sur iu insulo. Sed en la mondo civilizita, kun ĉiuj komercaj kaj teknikaj progresoj ne estas danĝera la troloĝateco; precipe ĉar la tero havas spacon kaj nutraĵon por 9 miliardoj da homoj. Ĝis nun ekzistas nur 1800 milionoj. Eble estonte la homoj devas atenti la problemon de troloĝateco. Sed mi kredas, ke niaj posteuloj ankaŭ trovos la rimedojn, kiujn jam hodiaŭ uzas multe da homoj por malpliigi la naskiĝojn.

Sed kiam ni ne aliigos la nuntempan monsistemon, tiam neniam ni povas forigi la krizojn ekonomiajn kaj la senlaborecon. Ankaŭ la rentuloj devas nepre malaperi. H. Mees en sia broŝuro konsideras la rentulojn nur kiel areton malgrandan, sed tiu areto ricevas sen laboro per la rentoj kaj dividentoj la duonon el ĉiuj enspezoj de la laborantoj ĉiuprofesiaj kaj ĉiuklasaj.

Pri tiuj tre gravaj aferoj aperos artikolo en iu de niaj sekvontaj kajeroj.

# LITERATURO.

Ni enpresis jenan du rakontetojn el la broŝuro «Es lebe der Krieg» (Vivu la milito) de Bruno Vogel, eldonintoj: «Die Wölfe», Leipzig-Plagwitz. Ni ne presis ilin pro la tendenco, sed ni nur volis publikigi la trafan manieron de l'aŭtoro priskribi la veran .econ de l'milito.

## La morto de l'sacerdoto.

Post preskaŭ dudek minutoj estis disrompita la bolŝevika fronto apud Kaluzeem per bonege precisa kaj energia kanon-atako, kaj, ne trovante rimarkindan kontraŭstaron, marŝis la blankaj trupoj orienten, al Riga.

Mi estis tro lacigita — kaj proksime de Anting mi sidiĝis fine sur la haŭbizon ĉe la ekstremo de l'baterio.

Sed mi ne povis endormi.

La akra sunlumo ruĝe flamis tra la palpebroj.

Varmega estis ĉio, la malmole puŝanta fero de l'sidejo, kaj la aeroj, kaj la densa polvo-nebularo.

Preskaŭ forgesitaj rememoroj turmentis mian cerbon kiel putrado.

Kelkfoje oni aŭdis ankaŭ malproksimajn pafil-pafojn aŭ la malkontentan blasfemon de iu kanonisto.

La kanonistoj devis iri apud la kanonoj.

Poste eksonoris iu melodio — melodio ebria pro feliĉo.

Ĉiufoje pli klare:

« . . . kaj ili kisis sin reciprok'  
dum la belega somertemp';  
kiam ĉe la arbar', kiam ĉe la arbar'  
Floris la eglanteriar' . . .

Komence mi kredis, ke mi sonĝus.

Sed, kiam mi rigardis supren, rajdis tridek, kvardek paŝojn malantaŭ la baterio, ĉe la plej antaŭa grupo de iu kavaleri-taĉmento, germana leŭtenanto, kiu blovis en malgrandan trumpeton.

Tiel strange estis tiu harmonio tie ĉi — tiel dolĉe — tiel homece.

Oni haltis. Akvo estis trovata.

Post kelka tempo oni tiris kaptiton el l'arbustaro apud la strato.

La leŭtenanto kun la malgranda trumpeto rajdis al li.

Kiom da jaroj ci havas?

«Dekses jarojn» respondis indiferente la kaptito.

Ĉu ci militservis libervole? fihundo! ekkriis akre la leŭtenanto kaj lia rusa lingvo estis malbona.

«Jes, libervole» respondis indiferente la kaptito, kaj la boto de l'leŭtenanto dispremis al li la nazon.

Oho! kaj kial ci militservis libervole?

«Mi estas komunisto.»

«Kiu ci estas?» kaj denove zigzagis la boto en la vizaĝon de l'kaptito. Tiu kraĉis kelkajn sangpecojn kaj respondis indiferente:

«Komunisto.»

Ĉu ci ne aliigis cian opinion?

Nu! atentu, kakulo!

Kiam ci ne estos plu komunisto, tiam diru tion.

Kaj nun frapis la rajd-vipo de l'leŭtenanto germana sur la kapon de l'kaptito Dekfoje.

Dudekfoje.

Ankoraŭ.

Senforma, sanga maso estis la kapo.

Kaj ankoraŭ.

Ĝis falis teren, la juna komunisto.

La leŭtenanto pafis kelkfoje al li, iu pafo puŝis el la sang-bulo la unuan cerbparton; kiel sulka bufo ebura ĝi sidis apude, kvazaŭ tie gardante.

Kiam la kvin rajdistoj, kiuj ekkaptis la bolŝevikon, kaj lin tenis dum la juĝa demandaro, sin ĵetis sur lin por trovi rublojn en la poŝoj, la cerbparto fakte piedpremiĝis.

Dume ankaŭ estis trinkintaj ĉiuj ĉevaloj, kaj oni marŝis antaŭen, orienten.

Poste, la turoj de Riga estis jam videblaj, ĉe mi iu voĉo diris pro rezignacio kaj pro abomeno, kiu ne povis malaperi:

«Pro kio ni batalas?
Por kiu estas tiaj sensencaj venkoj?
Ideo, kiu havas tiajn sacerdotojn
kaj tiajn malamikojn
havos certe la estontecon.»—

. . . kaj ili kisis sin reciprok' . , .

Tiel strange estis tiu harmonio — tiel — homece.

# La ekkrio.

Estis kiel mistero.

Neniu el ni plu sciis, kiom da tempo ni jam kaŭris en tiu ĉi obus-kavaĵo kontraŭ la morto.

Neniu plu sentis, ke malaperis horo post horo, tago post tago de l'vivo nur unufoje daŭranta, malaperis senkompate en la estintecon.

Senpaŭze, kiel la tempo, sonegis la impona muziko de l'mortigo dum ĉiu sekundo de nia perdita ekzisto.

Sed ni ĝin ne aŭdis plu.

Tiel ni malvigliĝis.

Subite, dum iu nokto, terure subite, ĉiom senmoviĝis.

Dolore vekiĝis nia konscio, kaj konceptis poste: La fronto senmoviĝis.

Iu lum-kuglo siblegante flugis alten, palpis, fantome pala, tra la malhelo de la nokto.

Staris iu homo inter la tranĉeoj, iu soldato.

Li supren eklevis la manojn kaj ekkriis: «Pa—trino!»

Poste li teren falis.

La lum-kuglo estingiĝis zigzage en iu obus-fendo, kaj la fronto ekkomencis denove la faron kutiman.

Patrino!

---

## Pojaraj Abon-prezoj de nia revuo:

Albanio: 10 it. lir.; Argentinio: 2 pesos oro; Aŭstralio: 2 ŝil.; Aŭstrio: 3.50 ŝil.; Belgio: 10 frk. belg.; Brazilio: 3.50 Milr.; Britlando: 2 ŝil.; Bulgario: 60 levoj; Ĉeĥoslovakio: 10 kĉ.; Ĉinio: 0.80 arĝ. dol.; Danmarko kaj Islando: 2.50 kr.; Danzig: 2.50 guld.; Estonio: 150 emk.; Finnlando: 20 fmk.; Francio: 10 frk.; Germanio: 2 RM.; Greklando: 30 dr.; Hispanio: 3 pes.; Hungario: 2.50 kr. oro; Irlando: 2 ŝil.; Italio: 10 lir.; Japanio: 1.25 jen.; Jugoslavio: 30 din.; Latvio: 5 lit.; Luksemburgo: 10 frk. Nederlando: 1.25 guld.; Norvegio: 2.50 kr.; Pollando: 2.50 zlot.; Portugalo: 10 esk.; Sovetio: 1.10 rubl.; Svedio: 2 kr.; Svislando: 2.50 frk.; Turkio: 60 piastr.; USA., Kanado, Centra kaj Suda Ameriko, Antilioj, Kubo: 0.50 dol.


Esperanto-Presejo: A. Meissner, Frankenthal.